ĈIUTAGE EN LERNEJ'

Mazurko

Teksto: Anja Karkiainen
Muziko: Vesa Pölkki



© 2001 Vesa Pölkki & Anja Karkiainen

La lernejon mi ŝategas,
ĉar min scivolemo regas.
Mi kalkulas, skribas, legas.
Paŭzoj ne allogas plej.
Ĉiutage ion novan
oni lernas en lernej'

Kvankam lacas mia brako
mi pri ĉiu instrufako
libron portas en la sako
- legolibro pezas plej.
Ĉiutage ion novan
oni lernas en lernej'

Samklasanoj tie multas,
Kelkaj stultaj nur tumultas.
Instruadon mi aŭskultas,
ĝi min interesas plej.
Ĉiutage ion novan
oni lernas en lernej'

Teatraĵ', literaturo,
kanto el la partituro,
desegnaĵo sur la muro
- arto min ĝuigas plej.
Ĉiutage ion novan
oni lernas en lernej'

Plezuriga estas sporto,
gimnastike kreskas forto,
sed ludado sur la korto
tamen plaĉas al mi plej.
Ĉiutage ion novan
oni lernas en lernej'

Instruiston mi respektas
vere - mi ne nur afektas!
Misojn milde li korektas,
tial mi lin amas plej.
Ĉiutage ion novan
oni lernas en lernej'.

Li postulas, ke entute
ĉiuj agu bonkondute.
Ni ne batu, absolute,
eĉ se ni koleras plej!
Ĉiutage ion novan
oni lernas en lernej'.

Per informo kaj per sperto
li instruas nin kun lerto,
instigante kun aserto:
Mem pripensi nepras plej.
Ĉiutage ion novan
oni lernas en lernej'

Sed ne ĉie la infanoj
povas iĝi lernejanoj
pro malriĉo aŭ malsanoj.
Tion mi bedaŭras plej,
ke neniam ili povas
ion lerni en lernej'